

N. N. 32,
Elkreskis rozbranĉeto

tradukita de Joachim Gießner

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profeto'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,
Jen ĉiamviva Rozo

tradukita de Leland Bryant Ross

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profeto'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun impeto'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-aromo
Heligas per Digloro
la vojono de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝarĝojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

...

N. N. 32,
En rose så jeg skyde

tradukita de Thomas Laub

En rose så jeg skyde
op af den frosne jord,
alt som os fordem spåde
profetens trøsteord.
Den rose spired frem
midt i den kolde vinter
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder
omkap med Himlens hær:
en jomfru var hans moder,
Maria ren og skær.
I ham brød lyset frem
midt i den mørke vinter
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille
har dejlig duft og skær,
den lyse for os ville
og sprede mørket her.
I sandhed mand og Gud,
af syndens nød og pine
han nådig hjalp os ud.

...

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>.
sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (*Ros' Haruo*).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “*Es ist ein Ros entsprungen*” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde kaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.